



LA PACDEFENDANTO

N-o. 33. NEREGULA INFORMA CIRKULERO POR ĈEĤOSLOVAKIO Septembro 1954

KONTRIBUU POR DEFINITIVA MALEBLIGO DE ATOM-KAJ HIDROGEN-BOMB-FABRIKADO!

En la nomo de la Distrikta Komitato de Pacdefendantoj en la urbo Doksy ĉe lago de Mácha ni havis la honoron saluti la partoprenantojn de la Somera Esperanto Kolegio kaj deziri al ili agrablajn ĉeeston. Mi deziris al ili ankau multan sukceson al iliaj klopodoj. Ili kunvenis en nia urbo en la tempo, kian ĉiuj progresemaj homoj en la mondo kun entuziasmo kaj goĝa nenkontentigo travivis la sukceson venkon de la pactendaro, kiu estis atingita okaze de komuna decido por fini la batalojn en Indĉinio, Laoso, Vietnamo kaj Kamboĝa dum la geneva konferenco. Post longa tempo ni travivas la unuajn tagojn, dum kiuj ripozas oficiale la armiloj de la tuta mondo, kian oni nenie en la mondo militas.

La arda deziro de ĉiuj sinceraj kaj progresemaj homoj en la mondo estas, ke tiu ĉi stato estu tion fortigota, ke jam nenie okazu milito kaj por ke oni definitive finigu la produktadon de aton-kaj hidrogen-bomboj kaj ĉiuj armiloj, servantaj al amasa hommurdado kaj detruado de homaj valorajoj.

La internacia Esperanto movado sin honore envicigis en la mondan pactendaron per la fonda de Mondpaca Esperantista Movado, al kies fondigo donis iniciativon partoprenintoj-esperantistoj ĉe la kongreso de nacioj por la paco, okazinta en Austrio. Jes, Esperanto, kiel el internacia lingvo tutmonda, estas potenca ilo por la disvastigado kaj propagando de paccapaj ideoj kaj klopodoj en la tuta mondo. Pro tio ni bonvenigas la fonda-

igon de MONDPACA ESPERANTISTA MOVADO, kiel novan aktivan kunbatalanton por la tutmonda paco, kies estigo do -kunentas, ke Esperanto ne estas nur Esperanto, sed farigas gravoga rimedo por atingi mondpacon, progreson kaj feliĉon por la tuta homaro.

La disvastigado de paccapaj klopodoj kaj ideoj en la tuta mondo pere de la internacia lingvo Esperanto komencis, kaj ĝi devas farigi unu el viaj ĉefaj kaj plejgravaj taskoj!

Ni kredas, ke dum via estonta Somera Esperanto Kolegio en Doksy vi jan kun fiero prezentos pli da konkretaj rezultoj el via "MEM" kaj ni opinias tiajn rezultojn, kiuj grave kontribuos al la disvastigo de la pactendaro, t.e. varbi novajn homojn kaj naciojn, kiuj ĝis nun ankoraŭ ne apartenas al ĝi, rezultojn, kiuj kontribuos al efektivigo de daŭra paco en la tuta mondo por trankvila, paca kaj kreanta laboro kaj vivo de ĉiuj bonvolaj kaj paccapaj homoj kaj nacioj.

En tiu senco mi deziras en la nomo de la Distrikta Komitato de Pacdefendantoj en Doksy, al vi kaj viaj klopodoj, plenan sukceson kaj efektivigon.

Karel Tvrdek
prezidanto de la Distrikta Komitato de Pacdefendantoj en Doksy u Mách.j.

Rim.de red.: En tiu senco ankaŭ parolis k-do.K.Tvrdek ĉe la solena malfermo de la Esp-seminarioj kaj antaŭ la publiko dum inscenita "Venecia Nokto" ĉe la Lago de Mácha. Li tiel multe kontribuis al nia afero kaj sekve niaj gekdoj devas tion rekompeni per ankoraŭ pli aktiva laboro PER ESPERANTO POR LA MONDPACO!

LA MONDPACO SIGNIFAS FELIĈON POR
POR NIAJ INFANOJ

Tago, inter la plejbelaj de nia vivo, estas la 21. de julio 1954.

Tiu tage jam frumatene disaŭdigis nia ŝtata radio-stacio, ke oni subskribis kontrakton en la Ĝeneva Palaco por ĉesigi la militon en Vietnamo kaj interkonsentis finiĝi la batalojn en Laoso kaj Kamboĝo.

Kiel bele kaj dolĉe sonas la vorto paco. Kiel ĉarma estas la konscio, ke post ne finante longa tempo oni nenie en la mondo militas - nenie fluas homa sango, riĉiganta kelkajn unuopulojn.

Tiu ĉi tago sin registris por ĉiam en la mondhistorion. Malfacile eblas difini, kiu sentis sin pli feliĉa. Certe la vietnama popolo sentis plej grandan gojon. Jes, pli ol ok jaroj da sangaj bataloj kaj ne imagebla mizero turmentis milionejn da homoj, ĝis kiam finfine eksilentis la bombeksplodoj en sudorienta Asio, eksilentis la kanontondroj kaj tiktikado de la mitrajlesoj.

Kaj ĵus en la momento, kiam ni estis auskultanta tian gojigan sciigon, ni ekmemoris je nia filino Nadja, kiu foje al ni diris: „Panjo, pli bone estus, se ni estus ne veninta en tiun ĉi mondon!“ Tute surprizita mi demandis, kial? Kaj ŝi respondis „Daŭre tenas nur pri milito kaj, ni timas, ke ni foje matene vekigos kaj okazos pafado, ni tiom timas la militon“. Jen la respondo de mia, tiam eble dek jara filino. Tio estis en la tempo kiam la milito en Koreio disvastiĝis kaj cirkulis la diroj, ke ĝi povus etendi sin trans la tuta mondo.

Cu por patrino povas esti io pli terura ol la riproĉo de ŝia infano pro tio, ke ŝi donis al ĝi la vivon? Tiuj vortoj min profunde vundigis, sed mi konsciigis, ke necesas respondi tiel, ke mi redonu al ĝi la gojhavon pri la vivo. „Ne timu, ne estos milito, vi povos trankvile dormi! Homoj, kiuj malamas militon, troviĝas en la tuta mondo, ili ŝatas vivi kaj da tiuj estas tion, ke ili sukcesos forigi militojn el la mondo!“

En tiu momento mi kaptis la decidon, kiel esperantistino nin en-

vicigi al la defendantoj de la mondpaco kaj neniam mi bedaŭros, nek plej grandajn klopodojn, kiuj povus servi al la tutmonda pacmovado, por malaperigi militojn por ĉiam el la mondo.

Pro tio mia gojo pri la militfino estas tiom granda, ja la vero, justeco kaj humanismo venkis la militfurion - la vivo venkis la morton!

Kaj nun dependas de ĉiu el ni, sen diferenco de la nacieco, partiececo kaj religio, ĉu ni sukcesos la pacon, kiu nun regas en la tuta mondo, por daŭro defendi.

En tiu ĉi batalo por la defendo de la mondpaco, devas ludi grandan kaj tre gravan taskon nia esp-ista movado. Estas la devo de ĉiu esperantisto, konvinkigi ĉiun ajn, ke la lingva diferenco ne povas esti kaŭzo por malamikeco, ke tiu, kiu alian lingvon parolas, ne estas nia malamiko, ke la homoj de la tuta mondo havas nur unu malamikon, kaj ĝi estas la faŝismo kaj imperialismo. Nia devo estas konvinki ĉiun, ke pli ĉarne sonas la infana rido ol la metala sono de oro, ke pli bele ol la brilo de oro - radias la okuloj de niaj infanoj!

Marta Hrečková

KOPŘIVNICE No. 474, Morava, Ĉeĥosl. Rin. de red.: La subskribita aŭtorino ŝatus en tiu senco ligi kontakton kun alilandaj pacdefendantoj.

NI NE POVAS SILENTI !

En 1952 grupo da japanaj sciencistoj ekiris al internacia kuracista kongreso en Italio por doni siajn konstatojn pri la faligitaj atombomboj sur aliaj urboj. Malgraŭ supozita bonvolo de la itala registaro, tiu subite malpermesis la kunvenon, evidente pro premo de alia ŝtato. La japanaj prelegoj estas nun en esp-a traduko, kies atesto terura skuas la animon de ĉiu kuraciganta plenuni la devon ĝin legi.

Sur epitafio ĉe Hiroŝima estas: „En kvieto vi ripozu, ĉar la eraron ni ne ripetos!“

Se la nacio, kiu faligis la inferbombojn, patronis au aprobis tian moralajon, oni rajtas demandi, por kio do ĝi kun aliaj, ankoraŭ komercas en tiaj diablajoj? Efektive, la „eraro“ ripetita, signifus la morton de la mondo, almenaŭ en la forno kaj ordo en kiuj ni nun konas ĝin. Estas cer-

Daurigo sur 7.p.

PRIPENSU ĈI RASAN PROBLEMON !

Staras ras-baroj nur inter barbaroj. Tiaj ne ekzistas inter esperantistoj, sed la esperantistoj devas ilin disrompi !

Josephine B a k e r, mondfama dancistino kaj kantistino el Parizo, kiu vizitis Japanion por fari almozan prezentadon por la bonfarto de miksrasaj orfoj, prelegis pri la rasa problemo la 2. de majo ĉe la Osaka Jogakuin. Kiel oficiala delegitino de Propagando kontraŭ rasismo kaj Ligo de internaciaj kultur-asocioj, ŝi parolis pri la rasa problemo en Usono, Danujo/rilate Gronlando/, Belgio/rilate Belgan Kongon/, Norvegio ktp., akcentante, ke neniam feliĉo estas konstruebla sur alies malfeliĉo. Jen nur kelkaj punktoj el ŝia enhavoriĉa longa parolado:

"Vi mem demandus kial mi, kiu havas tiel multan admiron pri viaj kutimoj kaj kiu estas tiel fiera pri sia originala afrika fono, kial mi nun parolas alian lingvon anstataŭ mian propran originalan de miaj afrikaj prapatroj.

Mi povas respondi al vi dirante, ke kvankam mi ne bedaŭras paroli diversajn lingvojn, tio estas ne mia elekto, ke mi parolas ilin. Ili estas nur la lingvoj, kiujn oni lernigis al mi, kaj poste en mia vivo kiam mi kapablis lerni mian originalan lingvon, mi ne havis eblecon aŭ tempon, ĉar mi jam aligis al tiu ĉi militiro por liberigo de la homaro kaj jam prenis sur miajn ŝultrojn tiun ĉi ŝargon, kies respondeco estas tiom granda, ke ĝi forprenas mian tutan tempon.

Mi poste konstatis, ke la lingvoj, kiujn mi parolas, estas pli internaciaj kaj ebligas al mi ĉirkaŭiri la mondon, farante multajn amikojn por la idealo al kiun mi kredas. Jen kial mi ne parolas la lingvon de miaj prapatroj.

Vi eble mirus ankaŭ kial mi portas sur mi okcidentan vestaĵon. Mi povas respondi al via penso dirante, ke se mi estas vestita alimaniere ol miaj prapatroj, tie ankaŭ mi ne havis mian elek-

ton. Ĉar oni sendis miajn praavojn al Usono kiel sklavojn kaj ili perdis siajn nomojn, personecon kaj dignon. Tiamaniere oni devigis ilin akcepti kiajn ajn vestaĵojn, kiujn oni donis al ili. Ili estis ordonataj vestiĝi kiel la mastroj deziris kaj kvankam tiuj ĉi vestaĵoj ne akordas kun ilia koro, ili devis akcepti ilin nur pro neceso.

Kio estas pli malbona, tio estas, ke jarojn poste, la vestaĵoj, kiujn miaj prapatroj estis devigataj surmeti, alportis por ili humiligon kaj malfeliĉon, ĉar iliaj mastroj prinĝis ilin. Dum multaj jaroj ankoraŭ poste, miaj samrasanoj estis mokataj de la usona blanka popolo. Mi memoras, ke nur antaŭ 15 jaroj ili estis nomataj sinioj, plenvestitaj kiel cirko-ĉevaloj. Kaj nur antaŭ 2 jaroj okazis, ke kolora virino vere estis proklamita kiel e-leganta !

Tio estas mi, kiu havis la honoron disrompi tiun ĉi baron en Usono inter la kolora kaj blanka raso, ĉar mi gajnis la titolon de "Plejbele vestita virino" de la jaro el dek plejbele vestitaj virinoj de la mondo. Malfeliĉe tamen pro la tiaj cirkonstancoj kaj pro la problemo inter la kolora kaj blanka, tio ne estis publikita, kiel devus okazi se mi estus blanka, sed la tuta blanka popolo ne deziris, ke oni diskonigu, ke Negrino gajnis tiun ĉi titolon. Jen vi vidas, tiuj ĉi vestaĵoj alportis al mi ne ĉiam feliĉon."

La supran ekstraktaĵon ni esperantigis el anglalingva ĵurnalo "The Mainichi". Ĝin ni utiligas ĉi tie NE por inciti la senton de iu raso kontraŭ alia, sed nur kiel enkondukon al la sekvantaj prikonsideroj pri iom alia, sed neniel malpli grava rasproblemo.

1/ Se temas pri la homrajtoj, niaj afrikaj fratoj havas por si tian multlingvan pledantigon, kia Josephine B a k e r antaŭ la tutmonda publiko, kaj kapablaj kiel ŝi, feliĉe estas ne malmultaj el ŝia raso.

2/ Tamen en la mondo vivas aliaj homgrupoj ignorataj kaj "same malmaltaj", laŭ okcidentaj etnologoj, kiel la afrika raso, nome, la Polinezi-anoj, la Melanezianoj kaj aliaj, kiuj loĝas en insuloj grandaj kaj malgrandaj de la Pacifiko. ./.

ESPERANTON POR LA FESTIVALO

DE LA MONDJUNULARO

3/ Rilate ilin, ekstaris antaŭ ni la rasa problemo de tute nova kaj ne pardonebla speco post la 1. de marto 1954, kiam la hidrogenbomba eksperimento de Usono difektis la vivon de la almenaŭ ĝis nun nombritaj 23 japanaj fiŝistoj, 236 indigenoj de Marŝal-insularo kaj 28 Amerikanoj.

4/ La vivo de la sub 2/ nomitaj homgrupoj kaj la fekunda tero, de kiu dependas ilia vivo, estas hodiaŭ elmetata al ĉiu ajn momenta minaco de la mortiga radioaktiveco kaŭze de la ankoraŭ provotaj similaj eksperimentoj - kie ajn ili okazus en la Pacifiko, ĉu en la maro teritoriaŭ publika.

5/ Por la nomitaj homgrupoj, kiuj estas senprotektaj kaj tute ne ekipitaj eĉ per unuopa amaskomunikilo por morala defendo, ni, la homaranoj pledas al la tutmonda esperantistaro, ke la vivo de la ignorataj homfratoj estu protektata per nia esperantista voĉo!

6/ Ni rekonas, ke nia voĉo estas malgranda. Sed, se ĝi eĉos kaj reeĉos tra la tuta mondo helpe de ĉiuj seriozaj kaj aktivaj esperantistoj en parolo kaj skribo, ni ne dubas, ke ĝi farigos sufiĉe "forta voko" por subigi la Monstron, kiun nia jarcento naskis.

Ĉar UNESKO, kiu iam bonvolis deklari, ke la valor-distingo de rasoj laŭ haŭtkoloroj estas tute sensignifa, ial mutas pri tiu ĉi grava afero, kaj ĉar ni kredas, ke nia esperantista devo estas ne simple lingva, sed ĉefe morala sur bazo de la homaranismo, ni publikas ĉi tiun unuan artikolon, dezirante nem vidi kaj ankau vidigi al la cetera mondo, ĉu vere tuja, vasta kaj efika estas la Esperant-lingva "ĉenreakcio" de la tutmondaj gesaniĝeanoj se temas pri batalo kontraŭ scienca eksperimentado kun malhoma celo.

Sukcesigu nian eksperimenton diskonigante nian vidpunkton kaj kontaktu pri tio kun la "RONDO DE HOMARANOJ", k-do. H. Hirose, 66 Koyama-Nishiono, Kamikyo, KYOTO, Japanio.

Represo kaj traduko estas tutkore petata. Anticipan dankon!

El organo de OOMOTO kaj UHA Protestojn direktu al Organizo de Unuigitaj Nacioj/OUN/kaj pri tio informu en kopio ankau nian redakcion kaj la japanan Rondon de H.

Venontjare denove okazos la festivalo de la mondjunularo en unu el la popoldemokrataj landoj. Tiaj festivaloj sendube estas grandega kaj efika manifestacio por la paco kaj amikeco inter la tutmonda junularo. Tamen dum tiuj festivaloj same kiel en aliaj renkontigoj internaciaj/krom la Esp-kongresoj/ekzistas teruraj lingvaj malfacilaĵoj. Pro tio la esperantista junularo de la diversaj landoj dum la venonta vintro havos gravan taskon en la junularaj kluboj, rondetoj ktp., atentigi tiujn je tiu problemo kaj instigi ilin al lernado de Esperanto, por ke ili ne estu devigataj daŭre esprimi siajn sentojn kiel el sovaguloj per gestoj.

La preparoj por la junularfestivalo jam komencigas. Estus dezirinda, ke la esp-ista junularo povu multnombre partopreni ĝin. Ni ja posedas la plejfortan kaj efikan ilon por forigi la lingvajn barojn. Kiam oni renkontigos por fortigi la pacon kaj amikecon inter la popoloj, estas de alta valoro, ke la kunvenintoj kiel pacdefendantoj reciproke almenaŭ interkomprenigu!

En tiu senco ligu jam nun kontakton kun k-do.:

Bertit, E n g l u n d
Musikkären P 3, STRANGNAS, Svedio.

N I L E R N A S

el la fama PARTI-HISTORIO de Stalin pri la Sovjetunia Komunista Partio, ke la partio kaj la registaro post la revolucio en 1917 dekretis egalrajtecon al ĉiuj nacioj kaj naciecoj. Estas dirite, ke neniu nacio havu ian ajn rajton superan de la alia. ne eblas ofendi la naciecojn, eĉ oni ne altrudu ian nacian lingvon al alia nacio. La samrajteco estas grava bazol

Tiu ĉi dekreto valore kontribuas al amikeco inter la nacioj kaj finfine al tutmonda paco.

Pál Balkányi
Budapest-Hungario

Ne forgesu uzi nian MIGRANTAN BIBLIOTEKON kaj MIGR. EKSPozICION

HIDROGENBOMBOJ MINACAS TERGLOBI
LA TERGLOBON

D-ro Charles O. Bostwick, ysona kemiisto, kiu translogis antaŭ unu jaro al Svedio, esploris interesajn faktojn pri plua grava danĝero, kiu minacas al nia terglobo kaŭze de nuraj eksperimentoj per aton-kaj hidrogen-bomboj. D-ro Ch. O. Bostwick, kiu apartenas al neniu pol. partio, estas esperantisto kaj sekve ankau entuziasma defendanto de la nendpaco. Kvankam jam ekzistas sufiĉaj argumentoj por postuli nepran malpermeson de tiuj diablaĵaj amasmortigiloj, tamen ni opinias tre grava, ankau informi niajn batalantojn pri tiu ĉi nova danĝero, kiun konstatis d-ro. Ch. O. Bostwick kaj pri kiu li jam raportis al diversaj nacilingvaj journaloj:

„Kio okazus kun la vivo sur nia terglobo en tiu ĉi epoko de la A-bomboj, H-bomboj, Co-bomboj kaj robotraketoj, se multaj eksplodoj estus inscenotaj ĉiun antencaŭa ni -lito inter "Okcidento" kaj "Oriento", aŭ sekve de nuraj eksperimentoj per tiuj ĉi armiloj spektale, se oni eksplodigus ilin en la supera atmosfero, kie troviĝas la ozona tavolo, protektanta la vivon sur la terglobo kontraŭ la pereigaj radioj de la suno?

La tielstaro motivo por firma kredo, ke nia ozon-tavolo estus detruota kaj tiam la radioj de la suno mortigus ĉiun vivon sur nia terglobo en daŭro de kelkaj minutoj antaŭ ol la protektanta ozon-tavolo povus renovigi. Ozono troviĝas en la naturo, ĝi estas formata per la efiko de la sunradioj je oksigeno en la malvarmaj, senpolvaj superaj tavoloj de la atmosfero. Tre zorga esploro fare de G. M. B. Dobson kaj aliaj konigas al ni, ke tiu ĉi ozon-tavolo ŝvebas super la tero en alteco de 25 km. kaj la tuta kvanto, se ĝi estus ĉe la surfaco de la tero kaj sub la atmosfera premo sufiĉas formi tavoloeton de nur 3 mm. La sciencisto H. N. Russell diras, ke la protekto-efiko de tiu ozon-tavolo egalas tri foliojn de ormetalo. Nur tre malmulte de ozono troviĝas apud la polvoŝargata varma surfaco de la tero. Ozono perdas la sian protekto-tenon kontraŭ la sunradioj kiam ĝi kombiniĝas kun aliaj materialoj aŭ

kiam ĝi ŝanĝiĝas al oksigeno, kiu senefikigas ĝian protekteblecon. En ordinaraj temperaturoj ozono oksigenigas tre malrapide. Je 100 gradoj/bolanta akvo/iom rapide. Je 300 gradoj la oksigenigo estas tuja. La dis-erigo de ozono estas multe pli rapidigata en pli malaltaj temperaturoj per uzo de metaloj kaj aliaj substancoj, speciale en polva formo. Eĉ argento rezist-pova je oksigeno, rapide reagis kontaktante kun ozono.

La protekta ozon-tavolo kaj ĉi-o vivopova sur la terglobo povus esti detruota per la ega varmeco kaŭzita de bombeksplodoj, eĉ pli, per la vastaj nuboj de radio-aktiva polvo dissternita tra la ozon-riĉaj tavoloj super la terglobo.

La malluma/nokta/flanko de la terglobo, en tiu tempo ne tuŝata de la sunradioj, estus afliktata de uraganoj kaj veter-katastrofoj.

Fine la sunleviĝo brulante ek-lumigus tiam ĉi tumultejon kaj la ankoraŭ postrestantaj vivoj estus eksternotaj fare de infero, kiun la homoj por si mem estis preparintaj. -

De d-ro. kaj s-ino. Ch. O. Bostwick, Ljungaverek - Svedio.

Sciencaj verkoj konsultitaj:

N. V. Sidgwick, The chemical elements and their compounds, vol. 2, p. 859.
A. Fuccon and F. Patat, Z. physical chem./1936/, 333, 459 p.
W. H. Otto and W. H. Bennett, J. Chem. Phys. 1940, 8, 899.
G. Stair, J. Res. Bur. Stand. 1948, 40.
F. A. Paneth and G. L. Edgar, Nature, 1938, 142, 112.
G. L. Edgar and F. A. Paneth, G. C. S. 1941, 511, 519.
H. N. Russell, Nature, 1935, 135, 220, Hinshelwood, Chemical Change in Gaseous systems, ed. 3. 1933, 17. 80, 240.
G. A. Hill, G. A. C. S. 1948, 70, 1306.
L. I. Kashtanov, N. P. Ivanova and V. P. Rishov, G. Appl. Chem. Russ. 1936, 9, 2176, BOA 1937, 1, 315.
G. R. Durland and H. Adkins, G. A. C. 1939, 61, 429.
/por gazet-mallongigoj vidu: Chen. Abstr., Am. Chem. Soc./

M. E. M. -traduk servo: C. Fielding, 61 Phyllis Crescent, /Ely/ CARDIFF, Anglio.

Ĉe la konita traduk-servo eblas ekiri kontakton kun d-ro. Bostwick.

MILITŜIPOJ KONTRIBUAS AL LA PAGO

Eskadroj de la sveda kaj sovjeta militŝiparo faris reciprokajn vizitojn en Leningrado kaj Stockholmo inter la 16a julio ĝis 21. La maristoj en ambaŭ lokoj havis bonan okazon konatigi kun la por ili ĝis nun nekonataj urboj, ĝiaj logantoj kaj vidindaĵoj. La vizitoj okazis en paca, harmonia atmosfero kaj atingis tre grandan interesecon de la popolamasoj. La Stockholmanoj ekz. havis okazon viziti la sovjetajn ŝipojn kaj plurfoje vidi kaj audi prezentadon de sovjetaj maristoj. Tiuj prezentadoj /dancado, kantado, muziko/, la grandaj popolamasoj, kiuj en Skansen /liberaera kultura muzeo kaj besta ĝardeno en Stockholmo/eĉ spitis daŭran pluvadon, la longe daŭraj aplaŭdoj kaj la spontanaj esprimoj de admiro flanke de la publiko, tio ĉi estas eĉ en nia bona lingvo malfacile priskribebla.

Al tiuj, kiuj sukcesis viziti la sovjetajn ŝipojn, la maristoj montris elkoran afablecon kaj helpemon. Ili ekzemple portis multajn infanojn supren trans ŝtuparoj k. lasis ilin rigardi tra la optikaj instrumentoj de la ŝipoj. Entute la sovjetaj maristoj restigis al la Stockholmanoj la memoron pri elkore gajaj kaj afablaj homoj, veraj majstroj de kantado, dancado kaj muziko kaj santempe personoj, kies konduto en ĉiu rilato estas bona kaj korekta.

La raportoj el Leningrad pri la akcepto de svedaj maristoj montras, ke tiuj en la sovjeta havenurbo renkontis atmosferon de varma simpatio kaj grandegan interesecon. Ili havis bonan okazon konatigi kun anaso da vidindaĵoj, muzeoj, parkoj ktp., kaj ankau povis, kiam lingvaj eblecoj tion permesis, paroli kun la Leningradanoj. Hejmen veninte pluraj Svedoj, inter ili ankau oficiroj, publike esprimis sian dankemon kaj kontenton pri la vizito en Leningrado.

Tiuj vizitoj sendube havas grandan signifon por la paco, kunlaboro kaj reciproka interkompreno inter la sveda kaj sovjetaj popoloj. Ni ja estas najbaraj popoloj, inter ni ne trovigas kaŭzo de mal-konsento, kaj ni ambau same bezonas

pacon. Kiam nun eĉ militŝiparoj de niaj landoj povis pace viziti unu la alian, ni certe povos estonte pli bone kunlabori sur kulturaj kaj ekonomiaj kampoj. La prezidanto de la Sved-sov. Asocio, advokato Georg Branting en sia parolado en Skansen sendube esprimis la sopirojn de multaj Svedoj kaj Sovjetanoj dirante: "Estu tiuj vizitoj kvazau glacirompilo por fari vojon al pli bonaj ankoraŭ interrilatoj inter niaj du landoj!"

Ing. G. Nilsson, Vygbyholm.

DEPENDAS DE VI

Ĉu vi deziras denove ricevi en viajn manojn bele ilustritan, bulgaran Esperanto-gazeton, au almenau simplan pacinforman bultenon por informi vin pri la vivo en nia lando - la lando de rozoj - , pri la teknika kaj kultura progreso de la bulgara popolo? Por ke vi eksci pri nia literaturo, muziko, teatro kaj sporta vivo ktp?

Do esprimu vian deziron kaj proponojn per multnombraj leteroj, kiujn vi sendu rekte al: BULGARA TELEGRAFA AGENTEJO, str. V. Leŭski No. 1, SOFIA, au al BULGARA ESPERANTO ASOCIO, str. "Stalin" 40, SOFIA, Bulgario.

Sofia Esp-societo, "Maksim Gorki"

TAMEN PROGRESO

El letero de k-do. P. Balkányi ni ekscias, ke tiu faras ĉion eblan por antaŭen puŝi nian movadon en Hungario. Li raportas pri eksterlandaj okazintaĵoj al la hungara packomitato, al la packomitato en sia laborejo, por murgazetoj k. jurnalaj, kaj laste li laŭlegis interesajn leterojn ricevitajn de siaj eksterlandaj gek-doĵ en kunveno de la loka packomitato, kiun oni speciale kunvokid kaj arangis por tiu ĉi celo. Partoprenis 24 personoj, plejparte virinoj. Tie li ankau menciis la lingvon, kiu ebligas al li akiri tiajn raportojn.

Estas eta laboro, sed kompare al la aparta situacio en Hungario, altvalora, ĉar tiel li preparas firman fundamenton por la estonta Esperantista pacmovado en tiu lando.

NI NE POVAS SILENTI daŭrigo de 2.p. te, ke atommilito rezultigus, ke cent-miloj da usonanoj kaj britoj, cindrigitaj kaj agoniantaj, torde kuŝus en maro da radio-aktiva koto, sub ruinoj de ne du, sed dekoj da urboj. Se ekzistus presejoj dum aŭ post tiu katastrofo, ne japanaj kripluloj, sed niaj propraj filoj provizus, al hazardaj transvivuloj, la bildan ateston de nia satana frenezo.

Ke oni konstruas la materialon por tiu fina "traro"/kiele tro moderega esprimo/!, ni legas hodiaŭ el raporto pri provizo de atomartilerio al la brita armeo. Ekuzo de ĝi signifus komencon de afliktego nepriskribebla por la homa raso - certe por la teknike evoluinta parto. Restus nur la industrie trenigantaj regionoj.

Tiuj, kiuj lasas sin dubigi, pri la vorto "PACO" en la postpardo de la verketo, sub impreso, ke ĉiu "paca organizo" estas suspektinda, faras al si ofendon de la racio. La faktojn, prezentitajn de la tri japanaj doktoroj-vidateŝtatoj neniu rajtas ignori. Ilia terura priskribo devus, ja devas, ŝoki la mondon en tiun stato de vekiginta moralkonscio, sen kiu ni kune marŝas en flaman neniceon. Kiel finorala marasmo kreskas la paraliza penso, ke jam la homoj metas la manon sur potencon, kiu povas detruigi la teron mem!

Kiel savi nin, se ne per agado inspirita de ankoraŭ pli alta potenco kaj sub la gvidado de fidelaj libroj kiel tiu ĉi?

F. R. B a n h a m

Kop. el of. org. de Australia Esperanto Asocio, "LA RONDO".

N I A M O V A D O E N Ĉ. S. R.

VEJPRTY, en aŭtuno ni 1/2 esp-istoj/intencas arangi kurson por komencantoj kaj fondi rondeton ĉe la uzina klubo "Tosta" en Vejprty. Vacek, DOKSY u Máchova jezera, la 9. arango de la jam tradiciaj Esp-kursoj pere de Somera Esperanto Kolegio en Doksy gis unua foje la patronecon de la loka Distrikta Packomitato. La kursoj procedis de la 25a de julio gis la 7a de aŭgusto. Dum la solena malfermo parolis k-do. Karel Tvrdek, prezid. de la Distrikta Packomitato, k-do. P. Mičík, estro de la kleriga kaj kultura fako de la Nacia Komitato kaj k-do. Rud. Burda, prezid. de "MEM".

7 instruistoj, d-ro. A. Pitlík, kiel direktoro, Jiří Kořínek, Ant. Šlanina, Eva Suchardová, Karel Solc, Václav Špúr, kaj Jos. Vitek, instruadis en sekvantaj kursoj: A-elementara, B-progres, C-konversacia, D-seminaria kaj E-priarto trakti kun homoj. En la admin. laboroj aktive helpis k-do. Frant Pytloun, kiu krom prizorgo de man-gajo, prezentis abundan literaturon al la partoprenantoj. Arangita artvespero, teatro-film-kaj danc-vesperoj multe plaĉis al ĉiuj. Ties programojn majstre plenumis geaktoroj E. Suchardová kun k-do. Seenann. Vituče ludis pianon k-dino Věra Škutová, kantis Vl. Chmelíková, Jan Kubišta kaj improvizita horo de k-do. J. Vitek. Dum tuttaga ekskurso al urbo Liberec oni rigardis faman ĉinan kolekтивon de artistoj en kanto kaj danco. Ne forgesebla ankaŭ rostos lampiona vespero, improvizita "Venecia Nokto" sur la lago de Mácha kun multaj ornamitaj boatoj, muziko, kantoj kaj impona piroteknika lum-raket-arango. Menciinda estas, ke dum tiu arango, entreprenita de esp-istoj okaze de la lastaj sukcesoj, kiujn atingis la pacfortoj en la Geneva-konferenco, alparolis la publikon, kiu anase partoprenis la prezidanto de la distrikta packomitato, k-do. K. Tvrdek. Lian prelegon ni prezentas sur la unua paĝo de tiu n-o.

La nunjara Somera Kolegio de Esperanto en Doksy farigis modela, koncerne bona kunlaboro kun la pacmovado.

Václav Š p ú r

PLZEŇ, membran kunvenon la 18. de aŭgusto partoprenis pli ol 30 gekdoj. Raportojn pri la someraj Esp-kursoj prezentis k-do. Pech Jos. R. Burda kaj Hořejší. Pri la internacia pacmovado raportis R. Burda. Por la aŭtunaj Esp-kursoj promesis ĉiuj partoprenintoj varbi alne-nau po unu lernanton. Pri organizaj aferoj raportis k-do. J. Reiser. La diskutoj pri la programo daŭrigis ankoraŭ en la kutina konversacia vespero post unu senajno k. estis tre vigla.

OPAVA, la 17. de aŭg. mi prelegis antau la membroj de la distrikta komitato de pacdefendantoj en Opava, kies kooptita membro ni estas, pri la temo "EN PORPACA SERVO". ./.

Unufoja publiko de korespondanenco kostas 2.-Kĉs ĉu 2 int.resp.kup.
 Ĉiu anoncanto respondu almenaŭ unufoje per p.k.al ĉiu petanto!

Eksterlandaj gek-doĵ,kiuj interes-
 as pri almet-etiketoj skribu al :
 K-do.Oldřich DOLEŽAL,Leninova ĉ 883
 HULIN, Morava, ĈeĤoslovakio.
 K-do.SOKOLOV Boris Ivanoviĉ/64jara
 fervojkontrolisto/Str.Stalina 45,
 ZDOLBUNOVO, Rov. Sovjetunio, deziras
 arangi grupan korespondadon de ler-
 -nantoj el 6-7aklaĝo de sia urbo.
 Ili ankau interesangus diversajn ob-
 -jektojn, bildkartojn, siajn fotojn,
 desegnaĵojn ktp. Skriba nacilingve
 kun aldono de Esp-traduko. La mate-
 rialon li uzos por prepag. murgazet.
 K-dino, Julie BOUCHALOVÁ, Zizkova 18,
 PÍSEK, ĈeĤoslovakio, kun ĉiuj landoj
 per il.p.kartoj.
 K-do.Pavel LIPKA, Luční ĉ.50, PLZEŇ,
 ĈeĤoslovakio, pri ĉiuj temoj, per il.
 p.k.kaj let.kun ĉ. landoj, interes. pm.
 La KOMITATO DE HIDROGEN-BOMB NATION-
 AL CAMPAIGN en Britio dezir. ricevi
 raportojn pri agado kontraŭ la uzo
 de Hidrogenbombo el ĉiuj landoj. Sen-
 -du al: K-do. FIELDING, 61, Phyllis Cr.
 /Ely/ CARDIFF, Anglio.

K-do. D-ro. Václav SKLÁDANY, TÁBOR ĉ.
 1031, ĈeĤoslovakio, kun ĉ. landoj,
 pri juristaj, muzikaj, kaj aliaj
 kultur. temoj Interŝangas il.p.k.
 K-do. Paul NICOLOFF, rue Sen, Dru-
 gina 6, V. TIRNOVO, Bulgario, dezir.
 interes. neuzit. pm. po serioj kaj
 U.P.U. -p.m. kun ĉ. landoj per rek.
 leteroj. Resp. garantiata.
 K-do. Jan SKUDERA, Dukelské nám. 27
 PLZEŇ, ĈeĤoslovakio, kun Austrio,
 okcid. Germanio, Svisio, kaj trans-
 maraj landoj. Interŝangas pm. kaj
 filat. afrank. leterojn.
 K-do. Karel SUCHANEK, Mánesova 12,
 PLZEŇ, ĈeĤoslovakio, per leteroj k.
 il.p.k. pri ĉiuj tem. kun ĉ. landoj.
 BRITISH ESPERANTO PEACE COMMITTEE
 15, Twisden Rd. Highgate Rd. LONDON
 N.W.5, Anglio, petas por anglaling-
 va paggazeto "PEACE NEWS" rapor-
 tojn pri via landa pacmovado. Sen-
 -du ĉion al la supre nomita adr.
 K-dino. Kalinka Atanasova MANOLOVA
 , GORNO-BOTEVO, St. Zagorsko, Bulgar.
 per let. kaj il.p.k. kun ĉ. landoj.

NIA MOVADO EN ĈSR /daŭrigo de 7a p./
 La prelego daŭris 25 minutojn kaj
 alportis por ni ne atenditan sukce-
 son. Ekz. al silezia verkistino Blaž-
 ková ni devis promesi ripeton de la
 prelego antau instruistoj en ilia
 sindikata kunveno post la lernejav-
 gancoj. Alia k-dino el urbo Hradec
 prunteprenis de mi la broŝuron "NI
 NE POVAS SILENTI" kaj petis kopjon
 de nia prelego per povi reciti ĝin
 ankoraŭ en kelkaj aliaj lokoj. Fine
 la estro de la SILEZIA STUDINSTITU-
 TO EN OPAVA, k-do. Mazur denandis nin,
 ĉu li povus ricevi por la instituta
 biblioteko Esp-gazetojn kaj librojn,
 kiujn ni disponas. Kompreneble ke ni
 tiĝn prizorgos. En la prelego ni an-
 kau menciis la malfacilaĵojn de nia
 movado, ke ni estas devigataj labori
 sen ia ajn oficiala subteno, sekve
 de kio ni daŭre luktas kun financaj
 baroj, estante subtenataj nur de nia
 oferema membraro.

La Distrikta packomitato multobl-
 igris la de ni pruntitajn japanajn
 pacdeklaraciojn kaj rezoluciojn kaj
 "JUNAJ HERBOJ" jap. bulteno de esp-pacdef. abonebla por 13.-Kĉs ĉe nia red.
 Eldonis: Závodní klub ROH-odbor ESPERANTO, TATRA, n.p. KOPRIVNICE, ĈSR.
 Redakcio: K-do. Rudolf BURDA, Palackého náměstí ĉ.6. PLZEŇ, ĈeĤoslovakio.

distribuis ilin al ĉioj lokaj pac-
 -konitatoj. La Distrikta Kontrau-
 faŝista komitato sendis al la uni-
 -versitato en Fioto salutleteron.
 Materialon kaj korespondajon ebl-
 as sendi al: Slezský Studijní Ústav
 , s. Mazur, OPAVA, ĈeĤoslov. A. Franti
 OLOMOUC, post intensivaj pluraj klo-
 -podoj niaj k-doĵ. en Olomouc suk-
 cesis per abunda materialo el la
 peresperanta pacmovado konvinkigi
 la Distriktan packomitaton pri la
 alta valoro de Esp-o en la servoj
 por la mondopaco. La komitato mem
 intervenis ĉe superaj oficialaj in-
 stancoj en Praha por akiri permes-
 on pretigi niajn publikajojn en la
 presejo. Bedaŭrinde ĝi ne renkontis
 komprenon tie. Malgraŭ tio la prez.
 d-rino. Böhmová promesis intensivan
 kunlaboron kun la Esp-pacmovado.

MUNICIO POR NIA BATALO :

K-do. O. Doležal, Hulín..... 2 Kĉs
 K-do. Jan Toufar, Brno 27 "
 Sonera Esp. Kolegio, Deksy.... 200 "
 K-do. Alois Křimša, Třinec.... 5. "

Redakcio: K-do. Rudolf BURDA, Palackého náměstí ĉ.6. PLZEŇ, ĈeĤoslovakio.